

# PENSEO

*N-ro 396*

*Okt. / 2024*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 35-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Mao Zifu (Ĉinio)



### optimisto

mi volus ke mi estu besto.  
 besto ĝuas eŭtanazion  
 Kiam ĝi kadukis aŭ paralizigis.  
 mi volus ke mi estu murdinto.  
 murdinto ĝuas eŭtanazion  
 Kiam li mortigis unu homon.  
 bedaŭrinde mi estas tigro dekmiljara  
 kaj homo mortiginta dek mil milionojn da  
 homoj  
 sed la idoj de la homoj esperas min  
 vivi dek mil jarojn  
 spite al mia kadukeco kaj paraliziteco.  
 kiel fari?  
 mi min murdu!  
 tamen mi estas rato kun leporkoro.  
 mi vivu testude.  
 se nur ratinoj min serpentus!

20240920

### *mise ne mise*

silento bruas en muziko.  
 la voĉo forgesita sunumiĝas  
 en korto kovrita de folioj.  
 ŝuoj iras ekster la ferpordego sensorura.  
 vento frapas sed ne viaj fingroj.  
 iama ĝiso fariĝis miso;  
 revido neniama sur la muro pendas.  
 tiktako estas taktiko  
 de tempo juste trompema.  
 jaroj pasis en sekundo.

knabino iĝis jam patrino de knabino.  
 la ido nomas min aĉjo.  
 avo aŭ aĉulo? nun ne grave.  
 misrenkontiĝo ne frukton miskreis.  
 en la mondo estas tro da falsaj patroj.  
 feliĉe mi restas paĉjo pura - de neniu.

2015.03.31

## Yi Qiao (ĉino en Germanio)



### Somnambulado en la

### koŝmaro

La militoj daŭras sufokante,  
 pleboj tumultegon tro suferas.  
 Sieĝite ni rifuĝas vante,  
 pro infesta plag' ni jam mizeras.

Sur ŝirmejon falas frida neĝo,  
 vestoj kaj manĝaĵoj al ni mankas.  
 Petas ĉiopovon ni per preĝo,  
 pro minuta paco ni jam dankas.

Somnambule ni jen dolorplenas,  
 fronte al l' obskuro de morozo.  
 Katastrofo ege nin ĉagrenas,  
 ĉu haveblas el Ĉiel' almozo?

Kugla pluv' kirlantas kun hororo,  
 en konfuzo svarmas mort-angoro.

### Revsopiro al mondopaco

Vid-al-vide ame ni rigardas,  
 kaj forviŝas larmojn reciproke.  
 Niaj koroj kun elano ardas,  
 amikiĝas verve ni surloke.

Tra ĉielo flagras helstelaro,  
kun eterna graco plenbonvola.  
Muĝas jen profunda vasta maro,  
plene de impeto korkonsola.

Ni turmentojn ĉiajn ĵus suferas,  
kunhavante samideon fide.  
Por finvenko ni jen sinoferas,  
ĝue l' saman amon kundecide.

Al tutmonda paco mi sopiras,  
kaj sincere al vi bondeziras.

Jam delonge ni disiĝas fore.  
mi solecas ĉiam kun ĉagreno.  
Vi aperas en la sonĝ' adore,  
kaj ridetas al mi kun mornspleno.

Jen susuras freŝa aŭtunvento,  
rememoro flagras tuj denove.  
Plene de la nostalgia sento,  
realigus revon mi nepove.

Supren plenan lunon mi rigardas,  
l' amikecon ame mi bongardas.

## Printempaj voĉoj

— dediĉate al Patricia Janečková\*

Flustras tra kamparo milde l' vento,  
kaj printempaj voĉoj dolĉe sonas.  
La ĉielo splendas kun prudento,  
am' vekigigas kaj esper' burĝonas.

Nova vivo al sunlum' aspiras,  
freŝas printemp-spir' kun bonodoro.  
Restu ĉe ni, kara, mi aspiras,  
verv' printempa as en ĉiu koro.

Kun glorklumo via koro rebatas,  
vi aperas en la sonĝo bela.  
Reviviĝu, sekve ĉio glatas,  
kantu do en ĉiu tago hela!

Primaver' eterna vin jen gvidas,  
kred' juneca ĉiam pur-rigidas.

— *Mi dediĉas tiun ĉi soneton al Patricia Janečková  
(ĉeĥdevena slovaka sopranistino, 1998-2023), kiu  
gardas sian gloran junecon eterne ĉe Dio.*

## Pensoj en mezaŭtuno

Hela l' luno pendas en ĉielo,  
lum' arĝenta flosas ĉi-vespere.  
Sidas mi en korto en lunnelo,  
kaj sopiras al vi tutsincere.

## Revsopiro al novepoko

En la splendan mondon ni alvenas  
plene de senfina sankta amo.  
Niaj koroj ja aplomb-serenas  
kun solena monda pacdeklamo.

Brilas supre l' suno kun disperso  
ekde tempoj praaj jam konstante.  
La senlima bona universo  
jen brakumas grace nin gigante.

Espereble venos novepoko,  
maro farbos la dezerton blue.  
Kun evangelio pri pacvoko,  
al prapatroj ni ridetos ĝue.

Pli prosperos jen de jar' al jaro  
esperplena nia globhomaro!

## Ora aŭtuno

Aŭtuno venas, sterne sin en bril',  
arbaro buntas kun folia or'.  
Venteto flustras freŝe kun dolĉtril',  
rikolto glora pompas en fervor'.

Sur kamp' sin kuŝas fruktoj de l' sezon',  
zefiro flirtas tra helblua alt'.  
En ĉiu branĉ' susuras belreson',  
kaj ĉiu roĵo lirlas jen sen halt'.

Tritiko jam maturas en orlum',  
folioj ŝvebas kiel festa danc'.  
Ĉe ĉiu kampo ŝprucas freŝa fum',  
kaj ĉio festas pro la bunta ŝanc'.

Rikolt' alportas nin kun plena ĝu',  
aŭtun' jubilas ĉie arde plu.



## Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Ni estis tre proksime – en la reto,  
La konatulo, nomo, nur vizaĝ',  
Pri amikec' – propono, peto,  
Komentoj kurtaj kun humur' kaj saĝ'.

Lakona parolad', ne babilado,  
La vortoj – el profunda sin',  
Honestaj, laŭdaj, dankemaj  
Pri kara al la koro poezi'.

Ĝis nun la vortoj sonas en oreloj,  
De nomo, de vizaĝo, siluet',  
Nur kurtaj frazoj, varmaj kaj sinceraj  
Kaj en dezerto eĉ aperos la poet'.

\*\*\*

Somero "pakas la valizojn",  
Senforta varmo de aŭgusta suno,  
Somero estas nia "eta vivo",  
Sed mi atendas aŭtunon!

Ĉielo blua, ter' floranta,  
La mar' karesa, la ripoz', sunbruno,  
Feliĉaj kaj liberaj tagoj,  
Sed mi atendas aŭtunon!

Esperoj dum la tuta jaro,  
Someraĵoj, dancoj kune,  
Pardonu min, somero gaja,  
Sed mi pli ŝatas aŭtunon!

La vento, tondro, uraganoj,  
Diluvo - kiel Dia puno,  
Sopiro, senreviĝo, larmoj,  
Sed mi tre ŝatas aŭtunon!

\*\*\*

Pri Vi la strofojn verkas la poetoj,  
Oh, kiel ĉarmas Via melodi',  
La pluvo pianludas, kantas vento,  
En valso de folioj - la beleco kaj graci'.

Vi mem similas al poem' mirinda,  
Karesa lasta bril' de ruĝa suno,  
Kiel malfrua am', al ĉio blinda,  
De jar, de vivo, nia ora Aŭtuno!

## Ángel Arquillos (Hispanio)



### Bonan vinon

Plezurcele,  
mi gustumas  
bonan vinon  
kompreneble,  
baldaŭ venos  
kapturiniĝo.



## Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



En mia mistero arbara  
jen fungoj, laŭdire, manĝeblaj,  
sed por kuirad' ordinara  
sen dub' ili estas marĝenaj.

Mi ilin observas admire,  
fascinan belecon revidas,  
sed en la stomakon, verdire,  
mi ilin enmeti evitas...

Samtiel ja kelkaj konatoj  
meritas admiron kaj ravon  
pro l'ĉarmo de la paroladoj,  
havantaj neniun enhavon.

Toleras mi tiun medion  
kun pompaj paroloj publikaj,  
sed, eĉ admirante ĉi tion,  
mi ilin ne nomas amikoj.

\*\*\*

La kanta konstipo obsedis min frue.  
La kanta konstipo obsedis min vane.  
En mia animo ĉeestas nun tru' de  
la pafarita de mi propramane

ne el la kruela pafotubo fusila,  
ne el la kanajla insido pistola,  
sed pere de bruske veninta al mi la  
maljusto embuska, vundanta pli ol la

eksplodo obusa aŭ bato ponarda  
ekstreme dolora, sed tamen honesta...  
Min nun en la sonĝoj turmentas la ar' da  
fantomoj, kaj l' esto ne plu estas festa.

Indulgu, amikoj, de mi atendantaj  
sinceran rimplekton en la melodioj.  
Ne kulpas mi ke ne plu venas la kantoj

eksteren al mia publiko hodiaŭ.

Kortuŝa espero min tute ne lasas,  
ke iam ekfluos kantaro lavange,  
ja mornaj mensogoj entempe forpasas,  
sed kantoj fascinaj cirkulas ensange.

\*\*\*

### *Aŭgusto. La lasta tago*

De la finsomera beno,  
La kaŭzo por meditado  
Pri l' sorto kaj senreveno  
De mia somer', pasinta  
En varma amika rondo,  
Kaj krono kun gust' absinta  
Anstataŭ multflora kron' do  
La kapon ornamas, kvazaŭ  
Entute finiĝas ĉio...  
Ĉu estas malbonokazo  
Por droni en nostalgio?  
Ho ne, ĉar konsolas min tre  
La mildo de lastaj floroj.  
Mi scias: varmigis vintre  
Min pri l' somer' rememoroj.

\*\*\*

Alfluis la tria ondo  
de miaj ĝardenaj floroj,  
por la finsomera mio  
pokalo da lasta ĝu'.  
En la multkolora mondo  
spegulas la rememoroj  
pri la okazinta ĉio,  
sed viv' mia fluas plu.

En pompo de l'hortenzio,  
en simpla de l'kalendulo  
en noblo de la dalio  
sentebles jam la aŭtun'.  
Flugemas pli l'fantazi' ol  
gruaro en for' nebula,  
kaj floroj ekscitas pli ol  
la homaj eventoj nun.

La viv' ne aspektas triste,  
la tagoj paradus feste,

la riĉa rikolt' bonguste  
bobelos en juna vin'.  
Jes, bonas ekzisti disde  
fiagoj, sed alta prez' de  
l'indiferenteco juste  
turmentas ja ankaŭ min.

\*\*\*

Boleto, la eta mistero,  
kaŝanta sin en konifero,  
post mia ĉasado dumhora  
ja estas trovaĵo valora.


Por la modestulo brunkapa  
ne licas aper' okulfrapa,  
ĉu tial do la vortareto  
ĝin nomas "la nobla boleto"?

Kaj ĉu ne samtiel ni trovas  
talenton, se foje formovas  
kurtenon de mildo honesta  
kun miro, en homo modesta?

\*\*\*

Facile fluas en mateno  
de fora fajro fumodor'.  
Nenio bruas - nur sereno  
en urbo dum dimanĉa dorm'.  
Tuŝetas arbojn vent' tenera.  
En pezan akvon falas or',  
kaj malrapida flu' rivera  
foli-monerojn portas for.  
Folioj oraj kovras padojn,  
susuras seke sub pied'...  
Plenigas domojn delikatajn  
aŭtuna laco kaj kviet'.

Ĉu nur en mi la sentoj ardaj  
aperas sub malvarma sun'?  
Ja vivas vi! Ja vestas arboj  
dek mil kolorojn de l' aŭtun'.



www.shutterstock.com

## Feri Floro (Hungario)



### Sereneco

Vi ne scias kie mi estas  
kaj vi ŝatus trovi min,  
serĉu min, vin mi atendas  
brakume bonvenigas vin.

Trovu min kie la suno  
subiros en la malproksim',  
aŭ tie kie la luno  
nokte brilas sen fin'.

Serĉu min inter folioj  
de belaj, odoraj rozoj,  
jen instigas karesadon  
ili estas ja sen dornoj.

Vi ne scias kie mi estas  
kaj vi ŝatus trovi min  
serĉu min, vin mi atendas  
brakume bonvenigas vin.

Serĉu min kie hirundoj  
ripozas dum la vintroj,  
kie ĉiam estas varma  
la ĉiel' profunde blua.

Trovu min sur la plaĝo  
kuŝanta en la sablo,  
sur boat' balanciĝanta  
en trankvil' silenta, paca.

Serĉu min kie vi volas  
por trovi serenecon,  
tie vin mi atendas  
kaj donas al vi mian koron.

## Mia muzo

En la mondo de la vortoj, mia muzo loganta,  
en la versoj vi estas mia damo adoranta,

dankon al vi, mia fonto de inspiro,  
naskiĝas la kanzono, eksonas la poemo.

La lum' de viaj okuloj, mian plumon  
kondukas,  
en miaj tekstoj, via esenco parfumas.  
Vi estas stelo, lumigas mian vojon,  
sen iuj duboj gvidas nian futuron.  
En la notoj de dankem', mi vin trovas,  
en miaj ĝemoj, mi pri vi songas.  
miajn versojn vi levas al altaĵoj,  
dankon al vi, mia muzo de kreaĵoj.

En la paletro de songoj, kiujn ni dividas,  
koloroj intensaj, ni kune konstruas.  
Vi estas melodi', vi dancas en versoj,  
dankon al vi, mia esenc' de la universo.

### *Mi volas vivi en harmoni'*

El la pasinteco venas senĉese la memoro,  
la nostalgi' aperas, eksplodas mia menso.  
Inter la antikvaj flustroj ekglitas nun la  
tempo,  
en la fora pasinteco preciziĝas mia sento.

Via majesta ĉeesto pulsas en ĉiu angulo,  
en la libro de la amo unu forta ligilo.  
La paĝoj rakontas pri nia historio,  
la koro ebriiĝas en la pasema danco.

Mi pensas je nia ero, murmuris la sopiro,  
kaj rimarkas viajn spurojn, tuj en ĉiu spiro,  
ke nia viv' estu la sama, kiel tiuj tagoj  
kaj la novaj ĝojoj floru en niaj memoroj.

Kune kun vi mi volas vivi en harmoni'  
kie la amoro daŭras en eterna simfoni'.  
Kune kun vi mi restas en la ombroj de la  
memoro,  
kie la eĥo de la ridet' estas en nia trezoro.

### *Ĝui la vivon*

Ĝui la vivon estas arto,  
kiun aprezas via kor',

danki por la momentoj,  
plene de belaj sentoj.

Ĝui ĝin estas vojaĝi,  
kun la menso kaj raci',  
la kulturojn tuj ekkoni  
kun diversa tradici'.

Kanti, danci, ridi multe,  
forlasi vian timon tuje,  
agi libere, aŭtente,  
forgesi zorgojn multfoje.

Ĝui la dian naturon,  
la ĉiaman sunleviĝon,  
Senti la marbordan brizon,  
dolĉigante vian animon.

Ĝui la vivon, vi elektas,  
la dezir' en ni restas,  
sekvi ĉiam la bonvolon sur la voj'  
por pluvivi feliĉe en la ĝoj'.

Ĝi estas donac' kaj defi',  
invitas nin por sperti mem  
ke la feliĉo povas esti,  
se ni lasas ĝin plukreski.

### *Vi, la plej kara*

Mi sentas, ke en la vivo,  
vi estas por mi la plej kara,  
plenigante min per ĝojo,  
mi sentas min tiel amata.

Mi donus al vi mian vivon,  
metus ĝin en viajn manojn,  
vi estas mia vera lumo,  
mia revo, mia sopiro.

Senĉese dum la tuta tago,  
vi ĉiam restu apud mi,  
ne gravas la opinio  
de aliaj homoj, ĉar gravas nur vi.

Vi, mia rozo kun dornoj,  
vi, delikata petalo,  
pere de via amoro,  
liberigu min de la zorgoj.

Amplena estas mia vivo  
kio pro vi tuje ŝanĝis  
kaj ek de tiu bela tago,  
kiam el viaj lipoj mi trinkis.

Tiu kanzono al vi diras  
honeste, ke mi vin amas,  
vi estas senc' de mia vivo,  
mia ĝojo, mia sonĝo.

## Hans-Georg Kaiser (Germanio)



### *Elirvojo*

Mi , kiu perdis la vojon,  
ne plu scias,  
kiun vojon mi iru.  
Mi iras, sed mi jam ne scias,  
kial mi iras plu sur tiu vojo.  
Mi iras, sed mi ne plu scias,  
kien mi iru.

Mi iras,  
sed mi perdis jam ĉiun esperon,  
ke la vojo kondukos min al celo.  
Mi iras plu, sed mi jam ne scias,  
kial mi iras ankoraŭ nun sur tiu  
tro ofte uzita vojo.

Mi iras, sed mi ja jam scias,  
ke ankaŭ tiu vojo,

kiu iam estis mia celo,  
ne kondukos min al celo.

Mi iras plu,  
tute mekanike,  
pro certa malkuraĝo,  
sed mi nun cerbumas obstine pri tio,  
kiun vojon mi efektive iru.

Mi iras plu,  
sed mi trovas kiel ĉiam –  
nur novan fuĝvojon.

## Saulo Salgado Wanderley (Brazilo)



### *Nature*

Nature ni vivas pensantaj pri Paco  
kiel lumo necesa sur niaj vojoj;  
senpaca vivo estas terura minaco  
kontraŭ la enaj sonĝoj de niaj koroj...

Nature ni volas Feliĉon por fakto  
kiu eliminus ja nian malĝojon;  
malfeliĉa vivo estas terura stato  
kiu vere malfortigas nian volon...

Tiamaniere pri bono pensantaj  
ĉiuj devas resti survoje marŝantaj,  
ĉar Paco ne estas medalo al nenio!

Se pri la Feliĉo envive sonĝantaj  
ĉiuj devas resti survoje amantaj,  
ĉar Feliĉo ne restas ĉe ni sen tio!

## Kresku Esperanto!

Ĝi progresas el La Lumo al La Lumo  
flame varmante la amemajn korojn  
kiel konvenas al la vivo-dumo  
pli riĉigante de la vivo horojn;

konsekvence pro la amagaj sumo  
kiu nin oferas belegajn florojn  
al ni sendataj de La Dia Plumo  
altigos nin al belajn honorojn;

akcelu, do, amon, kiel vi povas  
ĉar vi certe, multege, amipovas  
kaj vi ĝin vidos ĝuste je via flanko;

akcelu, do, vian korkaritaton

tiel al ne- kiel al la bonamaton  
kaj tiel kreskos nia Esperanto!

## Blazio Vaha (Hungario)



### *Du diligentaj strofoj pri duopa volo*

Ni povas perdi nur katenojn,  
kiel iam proletar',  
ja lernos Esperanton, iam,  
nur se volos... la homar'.  
Sed mi kaj ci tre volos lerni,  
kiam volos ci kaj mi!  
Ni ja la homar' ne estas, sed,  
lerni povas ambaŭ ni.

### Voĉoj en promenanto

Mi, mi, ne mi, miaŭas kato.  
Vi ne, ne vi, bojas hundo.  
Mi ne, homo, monologas.  
Ne vi, Dio, dialogas.  
Dio, nome, ne ekzistas.  
Homo, nome, ne ekzistas.  
Ni, en ni mem, kunekzistus,  
se mi, en mi, kunekzistus.

### *Por momento*

Kion vi, prahomoj, sciis,  
certe ne plu scias mi.  
Kaj ni nunaj ja ne scias,  
kion nepoj scios vi;  
kaj, vidante, mi ne vidas  
spertojn de amik-blindul'.  
Bebo spertojn mi forgesis,  
sed mi iĝos mort' spertul'.

por momento.



## Jadranka Miric (Serbio)



### *Mia najbarino, Duda*

Antaŭ mi staris ŝi  
vestita en robo blukolora.  
En ŝiaj manoj rozetoj, donacitaj de vi,  
Sur ĉiel' sunspuro de nubo ruĝora.

Jam sulkiĝis ŝia vizaĝo.  
Surfrunte videblas vivospuroj de  
maljunec'.  
Malgraŭ tio allogas ŝia beleco'.

En ŝiaj okuloj flamo  
ankoraŭ ne estingiĝis.  
Sur lipoj ridetoj pro la vivoamo  
kiu profunde en ŝia koro kaŝiĝis.

Sunsubiro ora sur ĉiel'  
similas al vivosubiro.  
Venas subite krepuske kiel lampir'  
aŭ kiel de vivo fina kismiel' .

### *Al mia belulin'*

Malfermu fenestron, mia Bela  
Salutos vin de vasta ĉiel'  
via kara Norda stel',  
kaj pala lun', la lanterno ĉiela!

Sur vasta maro malgajas mi,  
ĉar sen vi, la vivo estas kiel pun'.  
Ne malĝojiĝu kara, vi,  
baldaŭ revenos mi.

Luno kaŝiĝis  
malantaŭ nubbar',  
alte en ĉielo inter stelar'.  
Ne, ploru karulin' mia  
sed prizorgu pri la tria ano nia!

### *Tenera saluto*

Ariĝis ruĝa nubbar',  
pro sunsubiro koloriĝis la tuta ĉiel'.



Suno dronas en la profunda blua mar'.  
Dormu bone, mia anĝel'!

Disiĝis mallumo.  
Ekstere aŭdiĝis turtokverado.  
Subite sur ŝian vizaĝon falis la blanka  
plumo.  
Tenera salut', anstataŭ serenado.


Tagiĝo hela  
asertis ke la tago estos bela .  
For de vi, preĝas mi.  
Estu ĉiam sana kara, ci!

### *En songoj*

Via kiso varma kiel ĉi vespero  
tenera kiel tuŝo de papilio,  
subita kiel ĉi ŝanĝiĝanta vetero,  
bonodora kiel tiu blanka lilio.

Gajiĝis mia animo.  
Manoj provis saluti vin.  
Vekiĝis mi el la ebriiga sonĝo,  
malgajsente aperis timo.

### **Ivanichka Magharova (Bulgario)**



Printempa venteto  
en l' animo de Eva.  
Ama flugilojn.

Ruĝaj rozoj,  
konfeso de amo.  
Ili svenas en la salono.

Vespersunsubir'.  
La odoro de rozoj.  
Najbaro songas

La nokto falas.  
En la ĉambro regadas  
tango de pasi'

Printempa venteto  
en la animo de Eva.  
Ama flugilojn.

Ruĝaj rozoj,  
konfeso de amo.  
Ili svenas en la salono.

La tago mortas—  
sur la fenestro luno.  
Anĝeloj kantas.

\*\*\*

Gaja grileto  
Vagulo kun gitaro.  
Bardoj survoje.

Senvestiĝas jam  
la arbaroj en aŭtuno.  
Striptiz' por birdoj.

Pluvaj gutetoj  
kisas mian vizaĝon.  
Perdita ombrel'.

Vespertristeco  
survoje min vizitis.  
Krevitaj pneumatik'.

Palaraneaj'.  
Kreaĵo de la Dio.  
Pendas de angulo.

### **Erika Godó (Hungario)**



### **Varmaj someraj noktoj**

Estas varma somera nokto,  
malvarmeta venteto karesas mian haŭton.  
Steloj hele brilas sur la malluma ĉielo,  
alportante lumon al mia trankvila ĉambro.  
La pepado de griloj aŭdebla en la nokton,  
kies beleco preskaŭ lulas min en sonĝo.

La arĝenta lumo de la luno brilas sur min,  
la mondo dormanta en silento kaj trankvilo.  
Kiel trankvila kaj mirinda nun ĉiuj,  
la plej bela sezono estas somero.

### La vivo estas la plej granda direktoro

Vivo, la plej granda direktoro,  
en kies manoj ripozas nia sorto.  
Kreante, formante, gvidante nin,  
ĝi rerflektiĝas en nia ĉiu momento.  
Sed ni povas fidi la direktoron,  
kiu finfine metas ĉion en la lokon.  
Nia vivo estas foje dramo, foje komedio,  
foje tragedio, foje am-afero kun ni kiel roluloj.

Sed ĉiu troviĝas en sia loko kaj tempo,  
ĉar la vivo estas la plej granda artisto.  
Ni akceptu nian rolon, kiun ĝi atribuis al ni,  
ni ludas ĝin kiel ĝi volas ĝin kaj ĝis tiam.  
Ĉar tiel la ludo povas esti kompleta,  
kaj ni povas esti la ĉefroluloj.  
Ni danku la vivon pro la escepta ŝanco,  
ke ni povas esti partoj de ĉi tiu mirinda  
prelego.

### Se mi estus vento...

Se mi estus vento...  
Mi povus ŝvebi alte supre,  
mi vidus la teron sub mi.  
Mi dancus inter la branĉojn de arboj,  
mi karekus la vizaĝojn de homoj.  
Mi flugus ĉiam kun birdoj,  
mi admirus la bluan ĉielon.  
Mi flugus super la herbejoj,  
mi admirus la naturon de tie.  
Mi estus vento, en senfinco,  
kiu ŝvebas libere en la mondo.

### Aŭtuna sonato

La danco de flaviĝintaj folioj,  
aŭtuna vento mallaŭte blovas.  
La sunradioj inter la arboj,

ĉiu ombro flustras sekreton.  
Ĉiu unuopa guto de pluvo,  
plena de memoroj kiel puto.

Malvarmeta tagiĝo, matena lumo,  
velura nebulo ĉirkaŭbrakas min.  
Flaviĝintaj folioj, aŭtunaj pejzaĝoj,  
deziroj vivas ankoraŭ en koroj.  
Somero jam adiaŭis de kelka tempo,  
la vivo ludas aŭtunan sonaton.

### Nigra kato

Nigra kato promenas en la nokto,  
ĝiaj ungegoj estas akraj kiel klingo.  
Ĝi ĉiam kaŝas sin la mallumo,  
ĝia malhela felo brilas en la lunlumo.  
Kiel la steloj, kiuj brilas en la ĉielo,  
magia estaĵo, reĝo de la nokto.  
Sed ne timu ĝin, ne kredu je superstiĉo,  
ĝi nur volas iom da amo kiel ĉiu vivanto.

### Ni vivas unufoje

Ni vivas nur unufoje, jen la granda vero,  
nur estas unu vojo, ni marŝas sen celo.  
Momentoj brilas, kiel steloj en la nokta ĉielo,  
ĉiu revo teksas reton, donas esperon.  
Ĉiu paŝo, ĉiu vorto portas memoron,  
ni kaptas ĉiun temperon, kvazaŭ trezoron.  
La suno karesas, la vento dolĉe flustras,  
kaj nia tempo forglitas, sen ke ĝi nin avertas.

Brakumu la mondon, la kolorojn sentu,  
ĉiun sonon, ĉiun vidon en la koron enŝovu.  
Ne timu morgaŭ, hodiaŭ ni brilas,  
ĉar rido kaj larmo novajn sentojn ĉizas.  
Ni vivas nur unufoje, do vivu en libero,  
ĉiu minuto estas miraklo en nia vivo.

### Aŭtuna sunbrilo

La sunradio estas kiel ora fadeno,  
ĝi fluas mallaŭte inter la arboj.  
Brilaj ombroj, varmaj brakumoj,  
koroj batas pro la kiso de sunlumo.  
La magio de momento, kiu ĝi neniam foriras,

kavalkado de koloroj, mirinda spektaklo videblas.

La pitoreska kanvaso de la aŭtuna pejzaĝo, en kiu estas la eterna sekreto de la sunradio. Do haltu por momento ĝuu la naturon, sentu la lumon, la feliĉon en via koro. Ĉar en aŭtuno, kiam ĉio estas belo, la aŭtuna sunbrilo vivas en via animo.

## Haizi (1964-1989)



### Septembro

sovaĝaj floroj prosperas sur la herbejo, kiu atestis morton de la dioj  
la malproksima vento estas pli malproksima ol malproksimeco  
mia ĉevalkapa violono ploras sed sen larmoj  
mi redonas al herbejo la malproksimecon el malproksimo  
unu nomiĝas lignĉevala kapo kaj unu ĉevalvosto  
mia ĉevalkapa violono ploras sed sen larmoj  
la malproksimeco povas nur densigi florojn dum morto  
la hela lunlumo pendas super la herbejo dum miloj da jaroj  
mia ĉevalkapa violono ploras sed sen larmoj  
mi rapidas vipante la ĉevalon trans la herbejoj

(1986)

*\*Haizi aŭ Hai Zi (24 marto 1964 - 26 marto 1989) estas unu el la plej famaj ĉinaj poetoj en la 20-a jarcento. Li estis la flagtenanto inter grupo de junaj ĉinaj poetoj en la malfrua movado de obskura poemo dum la 1980-aj jaroj. La poemeto "Septembro" estis verkita ĉine de Haizi en 1986, kiam li vojaĝis en la okcidenta regiono de Ĉinio. Li mortgis sin ĉe Pasejo Shanhaiguan en la 26a de marto de 1989, tiam li estis 25jaraĝa.*



### Ardo (Ĉinio) elĉinigis

## Valbona Hadri



### Pavita

Pro la profunda respegulo de la luma radio, kie oni trafolumas la praecon de la malnovaj koloroj,  
rezistintaj al la tempo dum la jarcentoj, kie la dardanaj heroismoj saviĝis ene de la kastelaj muroj.

Ĉiu ties vorto reflektas adorece pri nia historio,  
stranga sento alkroĉis profunde ĉe mi la ĝojon,  
Kelkiu antaŭ mi rakontas pri la silentaj okazaĵoj.

Ili fariĝis parto de liaj skriboj kontinuante la vojaĝon  
ĝis la ĉeesto de la trezoro, kie daŭre elvolviĝas la vereco de nia historio.

La ora observo fermis la hodiaŭan tagon sub la suna varmo,  
esperante ke en la laŭvicaj renkontiĝoj aperos alia bildo mirakleca.

## Vaso Papa



### Adiaŭ Italia!

*(Al ĉiuj tiuj kiujn Dio helpis reveni hejmen el la elmigrejo)*

Svingi kaj skui olivarbojn je miloj,  
ĝis la negxon mi distingis sur la haroj,  
For de la hejmo, sole pasis la junaĝo,  
Longajn jarojn mi nostalgiiis.

Kelkaj petolemaj mevoj,  
forigis de mi la enuon,  
du-tri grappa, kelkaj cigaredoj  
alportis min la hejmon ĉe la okuloj.

Dio, finfine alvenis la tago,  
por reveni denove sub mian ĉielon,  
kie dolĉa ja estas eĉ la salo,  
apogi ankaŭ mi la tegmenton.

En la ĉielo la luno enflamiĝis,  
la pontoj iompostiome leviĝis.  
la krioj en la holdon etendiĝis,  
unu post unu la ŝnuroj falis.

La maro similas al la herbejo,  
luna radio per oro brodita,  
“Tarantella” sur la kajo,  
miajn okulojn sur larmojn deĵetis.

Ŝoajne la rondanco min trokaptis,  
ŝajne la kanzono min konkeris:  
“Adiaŭ Italia!” eĉe mi eksplodis,  
Mi la ondon alkrii: Prenu min!

Venas apude de mi soneto,  
kiel ni alvenis tiun nokton,  
La luno tremis sur la kajo,  
kaj ni serĉis alian fortunon...

Malsata mi foriris,  
animvundite, sed jen, okazis:  
Iu “Tarantelo” je estingita lumo,  
kaŝe unu mano sur mi elglitis...

Tremado tiam ĉe mi vekigis,  
la menso perdiĝas dum la karesoj.  
Kaj mi ĵuras, kiel tiu virino,  
mi ne vidis, ie ajn.

Mi foriras ĉivespere disde ŝi.  
kaj min demandas, kio okazis al ŝi,  
por ke serĉeku ĉe mi  
grizajn okulojn kiel laca maro!?...

La trageto karesas la ondojn  
kaj la luna lumo traboras la nubojn,  
Trans la maro, fora lando,

Adiaŭvin . Italia, mi ne forgesos...

*elalbanigis*



**Bardhyl Selimi**

**(Albanio)**

## El la Ĉina Antikva Poezio

### Sadula (1272-1355)

—*laŭ melodio Rivero plenruĝa*

La splendo de ses dinastioj<sup>1</sup>  
forpasis jam kun primavero  
senspure kaj nereveneble.  
Nenia informer' eĉ kun mizero  
alvenas el la urbo Jinling<sup>2</sup> plu  
La monto kaj rivero  
ŝanĝiĝis ja malkiel la antaŭaj.  
La paro da hirundoj en aero  
elflugis el la dom' de altrangulo,  
mi ilin iam konis sub la alero  
de l' domo ĉe la fino de l' strateto Wuyi.  
En nokt' profunda kun malhelo  
nur regas dezertec' kaj tajdoj  
frapadas la urbemuron kiel la megero.

Pensante pri paseoj mi ekhavas  
ĉagrenon kaj rankoron en la kor'.  
Nur pokaj spuroj de l' perdita regno  
ja restas en ruinoj sen valor'  
meze de herboj vualitaj en nebulo.  
Tumulte gakas korvoj ĉe vespera hor'  
sub la oblikve disverŝitaj sunradioj.  
La kanton, kiun la imperiestro kun favor'  
tre ŝatis, ne plu kantas la regnanoj.  
La Ruĝa Puto, kie li sin kaŝis for  
de kriza tempo jam disfalis kaj nur  
cikadoj ĉirpas triste kun langvor'.  
Senŝanĝa restas nur la monto verda  
kaj l' river' smeralda fluas kun sonor'.

1. *Inter la tria kaj sesa jarcentoj la regnoj de Wu, Orienta Jin, Song, Qi, Liang kaj Chen prenis Nankinon kiel sian ĉefurbon respektive.*

2. *Jinling: la nuna Nankino.*

## Ascendo sur ŝtona urbo

—laŭ melodio *Ĉarma kantistino*

Sur la ŝtona urbo\*  
mi rigardas al la for'  
kie kunfandiĝas du regnoj  
sub malalta ĉielo, en ĉi hor'.  
En la pompa urb' antaŭa de ses dinastioj\*\*  
nur videblas montoj jen en verd kolor'.  
Neniigis jam la sceno de pasinto:  
militflagoj kovris la ĉielon kun rumor',  
vic' kaj vico da velŝipoj pretis por  
sangbatalo kiel la flosantaj nuboj,  
blankaj ostoj kuŝis ĉie kiel neĝtavol',  
laŭ la bordoj suda, norda de l' rivero  
multe da herooj ja pereis kun rankor'.

En somerpalaco forlasita herboj kreskas  
ĉiujare sub favor' de l' orienta vento.  
Sur la padoj inter pinoj ĉe vespero  
nur videblas jen kaj jen dum momento  
la vaglumoj brilglimantaj terurige.  
La tiamaj belulinoj en palac' de splendo  
jam surportas blankajn harojn  
kaj lamentas pri pasinta junco en silento.  
Nun sur rivero brilas klara luno,  
restas nur en la mondo trista sentimento.

\**La ŝtona urbo aludas al nuna Nankino, tiam ĉefurbo de la regno.*

\*\* *Inter la tria kaj sesa jarcentoj la regnoj de Wu, Orienta Jin, Song, Qi, Liang kaj Chen prenis Nankinon kiel sian ĉefurbon respektive.*

*Elĉinigis*



**Vejdo (Ĉinio)**



## Ĉineske

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

### Sopiro al mondopaco

— laŭ ĉinesko Aŭguristo\*

1.

Klaras ĉielo  
pace simbola.  
Trankvilas vasta maro  
navig-favora.

Aspiras ni al  
paco popola.  
Sur voj' al idealo  
mi as fidvola.

2.

Justeca venko  
nin jam inspiras.  
Pri homar-harmonio  
ni ard-aspiras.

Kun samideo  
ni bondeziras.  
Al longdaŭra mondopaco  
ni revsopiras.

\**Aŭguristo (ĉine: Busuanzi): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.*

### Aŭtunmeza luno

— laŭ ĉinesko *Preludo de akvomelodio*\*

En aŭtunmezo  
laŭ tradicimor'  
oni kore festas  
kun sincerhumor'.  
La ĉiel' serenas  
dum la luno plenas  
je meznokta hor'.  
Oni vintostas  
kun osmantodor'.

